# TEJO tutmonde!

numero 2.1984 marto/aprilo 1984



## Vortoj el la redakcio

Finfine alvenas la promesita kajero!
En la pasintsomera IJK en Debrecen la Komitato de TEJO esprimis sian kontenton pri la funkciado de ĉi tiu periodaĵo. Tamen nur 5 - 6 el la nunaj Komitatanoj de TEJO iam ajn kontribuis al TT, nur 11 landaj sekcioj de TEJO iam ajn sendis ion al mi, nur 3 landaj sekcioj regule sendas siajn bultenojn kaj nur UNU landa sekcio nomumis komisiiton por regule kontribui al TT. Post la IJK en Swanwick Tobo ne plu teknike redaktos TT-on kaj mi volas denove migri Eŭropen kaj ŝatus plilibeniĝi - precipe se TT daŭre statos kiel nun. Legantoj (jes, vi ambaŭ!), pensu! Ĉu vere valoras havi TT-on? Se ne, sciigu viajn Komitatanojn kaj Estraranojn de TEJO - la TEJO-estrarano pri eldonaĵoj estas Norberto Saletti (Via Libia 20/4, I-40138 Bologna, Italio) -; se jes, kontribuu multe pli ...
(Kontribuaĵoj estas sendendaj - ju pli frue des pli bone - al P. Hopkins, Minota Hagey 112, Univ. of Waterloo, WATERLOO, ON, Kanado N2L 3G1).

En ĉi tiu numero vi trovos:
Informojn pri okazintaj renkontiĝoj en Argentino, Belgio, FRG, kaj Venezuelo,
Ideajn artikolojn pri la Internacia Jaro de la Junularo kaj la Pasporta Servo,
Leterojn al la redaktoro kaj
Kalendaron plenplena je porjunulaj renkontiĝoj dum la venontaj kvar monatoj.

Bonan legadon, Paŭlo

TEJO tutmonde aperas 6 fojojn jare por TEJO-membroj kaj la landaj sekcioj de TEJO.
Redaktas: Paŭlo Hopkins, Minota Hagey 112, Univ. of Waterloo, Waterloo, Ont., Kanado N2L 3G1
Teknike redaktas: Thomas Bormann
Presas & ekspedas: HAPS de GEJ, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1.
Hamburg

TEJO tutmonde. tweemaandelijks tijdschrift, verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

tejo

## TEJO-SEMINARIO, RIMINI, ITALIO:

# Modeloj de neperforta solvado de konfliktoj

*" Ĉu repago de vojaĝkostoj je 50 procento? ,,*

*"Ĉu kompenso por perdita salajro? ,,*

Jes, vere! Kiel partoprenanto de la Rimini-seminario, vi ricevos repagon de la duono de viaj vojaĝkostoj. Kaj, se vi estas juna laboristo aŭ senlaborulo, vi rajtos ricevi kompenson por via perdita salajro!

Sed konsideru ankaŭ la jenon: —vi bele loĝos en konata itala ĉemara banurbo,

—vi ekskursos al la ŝtateto Sanmarino

—vi ludos "novan ludon,, por praktike enplektiĝi en la seminaria temo,

—vi partoprenos diversajn prelegojn kaj diskutgrupojn, tiel helpante prepari la kontribuon de TEJO al Internacia Jaro de la Junularo, 1985,

—VI NEKREDEBLE DISTRIĜOS!

..............................................................................................................

Aliĝilo:

Nomo..........................................................................................................

Lando..............................................................aĝo.................................

Plena poŝta adreso......................................................................................

..............................................................................................................

Dato.................................Subskribo:

**Resendu tiun ĉi aliĝilon al: Rimini seminario,**

**TEJO**

**Nieuwe Binnenweg 176,**

**3015 BJ ROTTERDAM**

## Estrara kunsido en Hamburgo

Tuj post la IS en Niendorf, la TEJO-estraro kunvenis ĉe la sidejo de HAPS en Hamburgo, por sia vintra estrarkunsido. La ses partoprenantaj estraranoj diskutis ĝisfunde tre ampleksan tagordon kiu laborigis ilin dum tri tagoj, ofte ĝis tre malfrue en la nokto; inter la diskutitaĵoj estis la pretigo de buĝeto por 1984, la ratifo IJKi en Eringerfeld (FRG) en 1985 - post solvo de kelkaj lastaj proceduraj detaloj, la ekpritrakto de du aliĝpetoj al TEJO - tiu de Junularo Esperantista Svislanda kaj de plurlanda agadgrupo por Esperanto en Afriko -, la planado de pluraj agadoj por la venonta jaroj, pri eldonaĵoj kaj pri faka agado.
La kunsido diskutis ankaŭ la agadon de KER en la venonta jaro, kaj pridiskutis la agadon de la komisiono pri Jaro de Junularo 1985.
La estraro daŭrigos siajn laborojn poŝte, kaj plenkunsidos denove en Swanwick dum la IJK (kies programon oni atente prilaboris).


el 'koncize'

## 1984 - 1985 - 1986 - 1987 ktp

Ĵus finiĝis la Internacia Seminario de GEJ en Niendorf pri "la libera homo kaj la 'Orwell-jaro' 1984": ni ĉi tie intencas nek resumi la diskutitaĵojn de la IS, nek priparoli la jam tro ofte priparolitajn "danĝerojn" aŭ "riskojn" de tiu ĉi jaro; tamen, ni diru kelkajn vortojn pri la jararo antaŭ ni. 1984, kiel jam dirite, estas jaro tre influita de la antaŭvidoj de Orwell: al tiu ĉi jaro sekvos 1985, la Jaro de la Junularo, pri kiu ni jam ofte parolis. 1986 estos jaro de laboro, de preparo al grava evento de la Esperanto-movado: en 1987, fakte, nia lingvo centjariĝos.

Kion tio signifas por ni ĉiuj? Ja gravas ke nia movado sukcesis pluvivi kaj evoluiĝi dum la tuta jarcento depost la apero de la "Unua Libro". Esperanto kaj la esperantistoj devis, dum la jarcenta historio de la movado, alfronti gravajn taskojn kaj danĝerojn kaj gravajn provojn. Tamen, se ni sukcesis alveni ĝis la fino de la unua jarcento de nia historio, ni devas aktive pensi ke ni ne jam atingis nian celon, kaj ke granda kvanto da laboro ankoraŭ atendas nin. Pro tio, ni invitas ĉiujn al atenta pristudo de la plano pri la Jubilea Jaro: el ĝi fontu ideoj, agadoj, programoj, sukcesoj, konkretigoj. La Movado ja estas ni, kun nia ĉiutaga laboro.

el 'koncize'



## Sugestoj rilate la PASPORTAN SERVON

Por hungaroj la Pasporta Servo estas iom multekosta. Ne tro, nur tiel, ke oni aĉetas nur unu liston kaj transdonas unu al la alia, aŭ kopias kelkajn adresojn. Se la gastigantoj ĉie kontrolus la kunhavon de la Listo de Gastigantoj, por ĉiuj kunveturantaj personoj aparte, tiam oni aĉetus multe pli da listoj, kaj se altiĝus la eldonkvanto, la prezo de la listo povus malplialtiĝi. Tiam ĝi fariĝus vere populara en Hungario.

Mi scias, ke en la listo ne estas tro da spaco apud la adresoj, sed tamen estus bezonataj kelkaj allogaj vortoj de la gastigantoj, ĉefe en urbetoj kaj vilaĝoj nekonataj. Necesus nur kelkaj vortoj pri la proksimaj eblecoj kion fari. Sen tio PS **ne** fartas bone; kelkaj gastigantoj en multe frekventitaj grandaj urboj kaj marbordo estas tro turmentitaj, dum aliaj ne ricevas gaston dum pluraj jaroj. Simple ĉar la vojaĝanto ne estas informita pri tio, kion ĝi povus tie fari.

Sándor Hideg, Hungario

*Cetere, jen taŭga loko por enŝovi novaĵon:*

***Aperis la Listo de Gastigantoj 1984***

*689 adresoj el 51 landoj atendas vian viziton!*
*La listo ampleksas 68 paĝojn kaj denove havas 14 paĝojn da mapoj.*
*Por via informlaboro eĉ enestas tekstpropono por gazetartikolo por via loka, nacilingva gazeto.*
*La listo nun estas sendata al la gastigantoj senpage, aliaj povas aĉeti ĝin je prezo de 5 germanaj markoj (DM). La listo ankaŭ estas aĉetebla ĉe Sándor Hideg en forintoj.*

*DEJ, Pasporta Servo, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1, FR Germ.*

---

# 40a internacia junulara kongreso 13—20 julio 1984

140 Holland Park Ave., London, Britio W11 4UF

## *Leteroj al la Redaktoro*

**Esperanto – ĉu dua lingvo ?**

1-e prave:
Jes, la faktoj, kiujn prezentas s-ano Llusera en sia kontribuo, estas sendube pravaj, el statistika vidpunkto la Esperanto-movado stagnas kompare kun la tempo de antaŭ 50 jaroj. Mi eĉ povas aldoni nombrojn el la historio de la E-movado en GDR:
Antaŭ dek jaroj ni havis proksimume la saman nombron de membroj. Ni esperplene eldonis la unuajn librojn (**Nuda inter lupoj!**, diversajn prilandajn informilojn, ktp.), kion ni hodiaŭ ne plu sukcesas; ni sendis du delegitojn al IJK, en Hungario en 1983 estis nur unu asocia delegito!

2-e: tamen...
... oni ne vidu nur la kvanton. La Esperanto-movado atingis plurajn ne sensignifajn sukcesojn: la kunlaboro kun grandaj internaciaj organizoj kiel UN, Unesko, MFDJ, ECB k.s. Intensiĝis kaj plivastiĝis, ekzistas ampleksiĝanta faka agado. Niaj librobretoj pleniĝas per libroj, kiuj estas ne nur E-lingvaj sed eĉ (pli grave) valoraj literaturaĵoj kompareblaj kun naciaj eldonaĵoj. Ni devas konsideri, ke Esperanto ne estas nur lingvo, ĝi estas ankaŭ movado kaj ligita al ĝi kultura fenomeno, plej bone tion montras la konata kanto "Tiuj, kiuj ..." de Gianfranko, kaj ni ne forgesu tiujn homojn, por kiuj la movado estas kvazaŭ dua hejmo, kiuj ĉiun monaton veturas enlande aŭ eksterlanden al iu renkontiĝo kun amikoj aŭ nekonatoj, kiuj dancas tutnokte, amuziĝas kaj am-uzas. Por tiu grupo de la movado (kaj ĝi ne estas malgranda!) ne gravas, kiom da esperantistoj ekzistas entute kaj ĉu Esperanto estas dua lingvo por la resto de la mondo aŭ ne. Tiuj homoj trovas siajn amikojn, siajn personan kontentiĝon en la nuna movado.

3-e: komunike
Finfine ni enmetu nian ŝatatan lingvon en pli grandan kadron. 1983 estis la internacia jaro de komunikado. Rigardu la raportojn en via gazetaro, la televiziajn elsendojn, la tiutemajn librojn en la vendejo: Oni kutime traktas traktas la komunikadan problemon ĉefe el du vidpunktoj, la unua estas la politika (kiu komunikas kion kial al kiu), la dua estas teknika/teknologia: Per kio oni komunikadas. La esperantistoj estas preskaŭ la unusolaj, kiuj okupiĝas pri tria aspekto: la lingva komunikado. La esperantistoj, aŭ pli ĝuste la interlingvistoj inter ili, zorgas pri optimumigo de la internacia lingva komunikado. Tio estas grava tasko, pli kaj pli emfazata ankaŭ de ne-esperantistaj rondoj. Ankaŭ tiucele nur gravas, ke entute ekzistas Esperantistaro, kiu tenas la lingvon viva kaj evoluigas ĝin, la konkreta nombro ne gravas, same ne interesas la fakto, ĉu Esperanto estas dua lingvo por

ĉiuj, ni esperantistoj simple kolektas la faktojn, kiuj poste ebligos kreon de internacia aŭ tutmonda lingvo. Ĉu tio estos Esperanto, lingvo simila al Esperanto aŭ tute alia lingvo, tio ne ludu esencan rolon por ni, ĉar tiu onta lingvo sendube fundamentos en niaj hodiaŭaj spertoj.

Michael Lennartz, Germana DR

**Estimata redaktoro,**


al la artikolo aperinta en TT! 6 "Ĉu Esperanto malsukcesu kiel dua lingvo por ĉiuj?" de Pascual LLusera el Hispanio mi deziras fari kelkajn precizigojn:
Unue, UEA povas iel taŭgi kiel mezurilo de la nombro de esperantistoj en la mondo, sed ĝi ne estas definitiva ilo por tia kontrolo. Ĝiaj anonombroj ne nepre respegulas la E-movadon. Mi konas bonegajn esperantistojn, kiuj ne apartenas al UEA. Mi konas E-klubon, el kies membroj nur parteto membras en UEA. Oni do ne povas konsideri neebla, ke ekzistas dek milionoj da E-parolantoj nur pro tio, ke UEA havas tiom malmulte da membroj. Kompreneble, mi ne diras ankaŭ, ke tiuj milionoj ekzistas. Aliflanke, mia samlandano pravas pri tio, kiom da membroj de UEA kapablas (flue) paroli la lingvon. Mi konas ne nur membrojn, sed eĉ delegitojn, kiuj balbutas Esperanton.
Pascual LLusera diras "Se oni volas paroli mondskale ...". Unue, kiel ĉiu esperantisto scias, estas multe pli facile, malpli temporabe (el-)lerni E-on, ol iun ajn nacian lingvon (sed tio, cetere, ne signifas, ke E-o estas facila, kaj ke oni povas lerni ĝin simple rigardante la kolorajn bildojn de la lernolibro: Esperanto estas vera lingvo kaj oni devas serioze studi ĝin - kion multaj ne scias aŭ ignoras). Due, kio kompreniĝas sub "paroli"? Se tio estas saluti, adiaŭi kaj peti ovojn en vendejo, miliardoj da homoj parolas la anglan aŭ la hispanan. Sed, ĉu ili vere parolas tiun lingvon? Ĉu ili povas paroli pri ajno, povas uzi la lingvon ĉiutage en ĉiu sfero? (tiu kriterio estas aplikenda ankaŭ al Esp-o).
Oni ne povas taksi la E-movadon laŭ la nombro de partoprenantoj de kongresoj. Se ĉi tiuj ne estas amasaj kaj ne tro kreskas, tio ŝuldiĝas ĉefe al la financaj problemoj, ne nur al stagno en la progreso de E-o. Estas vere, tamen, kion li asertas pri la sento estigita de tiu malmulto: sento de solidaro, de aparteno al io, de kamaradeco. Se E-o venkos, tiu sento, tiu "interna ideo", forfalos. Jen klara kaj evidenta pruvo: ĉu vi sentas vin amiko de ĉiuj, kiuj parolas vian nacian lingvon?
Fine, mi volas diri, ke Esperanto certe nun ne estas internacia lingvo. Sed ĝi estas iom pli internacia, ol kiam ĝi naskiĝis. Kaj verŝajne post cent jaroj ĝi estas iom pli internacia, ol nun. Oni ne estu tro triumfisma, sed oni ankaŭ ne estu tro pesimisma.

Francisko Ksavero Moleon', Hispanio

## *speciala scienca informo*

### PRI RENKONTIĜETOJ DE ARGENTEJO

Konsiderante la homan korpon konsistigata el 206 ostoj, ni povas konstrui la jenan statistikan grafikon:




Supozante duonan falon de la kurbo ĉiujare, la laŭlogika ekstrapolado donas al ni la kuraĝigan informon pri tio, ke la venontan renkontiĝon ĉeestos la ekstremiga nombro de 824 !!! ...ostoj.
Tiun ĉi informon alvenigis al la redakcio, la citronsanga voĉdone ĵus nomita nova prezidanto de ARGENTEJO. Mi provis konsoli lin dirante, ke la malmulta ĉeesto estis justigita ĉifoje, ĉar ni du fojojn nuligis la renkontiĝon; unue en Puerto Rico pro inundoj, kaj due en Tigre, ankaŭ pro inundoj. Tiam oni faris, tute rapide kaj sen troaj zorgoj tiun trian klopodon, kiu fakte ne fiaskis. La frustraciplena mieno de la prezidanto iom pliboniĝis. Nun, li nur ŝajnas la ĝibulo de Notre Dame.



- Kontentiĝu! - mi insistis - pensu, ke nur gravas la kvalito, kaj ne la kvanto. Tiam li ploris. - Pensu do pri tiuj malfeliĉuloj kiuj ne povis ĉeesti. - Jes, jes - respondis li - tio ja konsolas min ĉar vi scias, ke mi estas malbona persono, kaj mi tre ĝojas pensante kiom da personoj ne povis ĝui la vastan programon de la renkontiĝeto.

Fakte, la dikega programo enhavis seriozaĵojn distraĵojn kaj distrajn seriozaĵojn. Ni pasigis du belegegajn sunoplenajn tagojn meze de rava grandega parko, kie ni loĝis en du superbelaj alpaj brilaj tutlignaj kabanoj, kun banoĉambro, fornelo kaj glaciigilo.
En la programo ni havis i.a.: "Argentejo sin prezentas ... (dum manĝas)", interkona vojaĝo, soleneta malfermo kun elektado de baptopatrino (Marina Fortugno), kiu eternigis sur la flago de Argentejo la daton kaj lokon de la renkontiĝo, kaj ni ... kantis ... La Espero (Blus')-n. Ni havis ankaŭ du grandajn matenojn de laboro kaj kvizon kaj aliajn (geajn) ludojn kaj nokte

"peña"*. Ankaŭ ni futbalis: knaboj kontraŭ knabinoj (preskaŭ). Pli nokte ni promenis en la tombejon, tra la sugestoplena, ombra parko.
Inter la seriozaj temoj, oni decidis krei ekonomian sistemon por la gemembroj, por ke ili povu facile aĉeti plenajn vortarojn, oni proponis ejon por la venonta renkontiĝeto (Mar del Plata) je pasko,
oni elektis novan prezidanton (Néstor R. Kalusky, kiu regos 2-jare, ĝis 1985),
oni varbis du pliajn membrojn por la Pasporta Servo,
oni kreis filatelan servon,
oni informis pri la IJK de 1984 en Swanwick (Britio), kaj ankaŭ pri la venonta kongreso de BEJO en Promissão (proksime de Sankta Paŭlo) kaj insistis pri la graveco partopreni en ĝi,
kaj oni nomis la Doktoron Rubén Feldman Gonzáles (kunfondanto de nia organizo, unua prezidanto, kaj kreanto de la fama Pasporta Servo) honora societano de Argentejo.

Néstor R. Kalusky, Argentino

* peña = dancado? (la vorto signifas '(kafoklaĉa) grupo' aŭ 'roko', 'ŝtono') tradicie.

## *Revo, revuoj, realo*

REVO: sendi ĉiujn niajn eldonaĵojn al ĉiuj junularaj organizoj.

REVUOJ: Impulso: ĝeneralkultura revuo, afero de hommanĝantoj: dufoje en la jaro ĝi aperas en ĉ. 24 impulsoplene, vore redaktitaj A 5-paĝoj, ofsete presitaj. Kunlaborantoj dise tra pli ol ok milionoj da km² – nia granda indiĝena kaldrono. Ĉiu numero kostas 3 irpk (inkl. sendokostojn), sed mendu maksimume kvar sinsekvajn numerojn.
Momenton!: fiinforma movada bulteno, afero de klaĉemuloj: sesfoje jare ĝi aperas en 8 – 12 tikle aĉredaktitaj A 5-paĝoj, ofsete presitaj (ankaŭ). Vi povas ricevi ĉiujn numerojn kontraŭ la sendokostoj (po ĉiu 1 irpk), se vi nepre volas informiĝi pri BEJO-aĵoj.

REALO: Tiaj do la revuoj, tia la situacio. Eble via klubo/organizo volas ricevi ilin interŝanĝe de siaj eldonaĵoj: dse pli bone! Kontaktu BEJOn (ne la laŭPIVan turkon, sed: Brazilan Esperantistan Junularan Organizon) per Caixa Postal 2761; 01051 São Paulo (SP), Brazilo

M. U. Ferreira, sekretario de BEJO

## *Belgio*

En la konataj IJK-konstruaĵoj de Leuven sepdekkvino da esperantistoj, jes aŭ ne ĝenitaj de trajnostriko, aperis de la 9a ĝis la 11a de septembro por kongresi pri "internacia komunikado". La programo montris taŭgan ekvilibron inter la pritemaj laborrondoj kaj la distra parto kun popoldanc- kaj kantprezento, kabaredo kaj vizito al la urbo kun ĝia tradicia longa parado pro "Leuven kermeso".
Dum la oficiala malfermo interalie "nia kara" urbestro salutis la Belgan Kongreson (parte en Esperanto) kaj poste li - kun glaseto da io kaj memorlibro de la IJK enmane - konfidis al mi, ke li kun ĝojo ankoraŭ memoras nian internacian junularan kongreson en 1982.
Flandra Esperanto-Ligo rerigardis al siaj kvin jaroj da agado, konstatante sian junecon pro ĉiam pli granda partopreno en la diversaj projektoj far la junularo (kiu siavice ankaŭ maljuniĝas kompreneble!). Ankaŭ fakte dum tiu ĉi kongreso montriĝis, ke la "ŝlosilfunkcioj" estis en manoj de junuloj.
Ĉu ni rajtas inviti vin jam por la venonta kongreso, verŝajne okazonta en la fama cep- kaj karnavalurbo Aalst?

Kristin Tytgat, Belgio

La aŭtuna renkontiĝo de Flandra Esperantista Junulara Asocio en 1983 okazis ne en Flandrio, sed en Valonio en la urbeto Wavre. Kvankam ne tiom da nederlandanoj kaj germanoj ĉeestis kiel en antaŭaj jaroj, ĝi estis ja bone internacia. La temo de la semajnfino estis "mediprotektado" kaj kadre de tio okazis laborgrupo pri socia aktivado pri medio, prelego pri juro rilate medion kaj lumbildoj el mediprotektema usona urbo. Krome ni ĝuis promenadon en la ĉirkaŭaĵo, dum belega vetero, muzikon far polaj ĉeestantoj, kaj denove unu el la famaj flandraj baloj. Korajn gratulojn al la organizantoj!

Jan de Webberlij, GB

## *Venezuelo*

La Venezuela junulara Esperanto-movado kresketas. En 1983 mi estis la unusola individua membro de TEJO en Venezuelo, sed mi estas preskaŭ certa ke en 1984 estos almenaŭ du krom mi. Ĉi-jare, okaze de la Zamenhofa Tago, mi sukcesis kolekti dek esperantistojn ĉe mi, el kiuj kvar bone parolas nian lingvon (nur tri estas pli aĝaj ol 25, sed malpli aĝaj ol 30). Mi estis reelektita kiel komisiito de Venezuela Esperanto-Asocio (VEA) por rilatoj kun fremdaj junuloj; mi prezentos komence de 1984 projekton de statuto de la "Junularo Esperantista Venezuela" al la estraro de VEA. Ĝis baldaŭ!

Germán Montero Alcalá

## *Kalendaro*

### APRILO

17 - 23: Seminario de TEJO; Rimini (I). Kosto: 150 gld. Aliĝilo en ĉi tiu numero de TT!

18 - 23: Internacia Junulara Festivalo; Rimini (I). Kosto: 110 000 liroj por ĝis-20-jaruloj, 120 000 liroj por 21-26-jaruloj, 140 000 por pliaĝuloj. Temo: La promesita lando. Programo: diskutado, teatraĵ- kaj filmspektado, muzikaŭskultado, lingvolernado (Esperanto aŭ itala), ktp. Informas: IEJ, C.P. 210, I-56100 Pisa, Italio.

20 - 22: Oka HEJS-tendaro, Córdoba (E). Temo: Esperanto kiel alternativo. Informas: Hispana Esperantista Junulara Societo, C/Atocha 98-4, Madrid-12, Hispanio.

20 - 23: Renkontiĝo Paska de NEJ, Bennekom (Nederlando). Kosto: 65 - 100 gld. (depende de aĝo kaj aliĝdato), pagenda al poŝtĝirkonto 20.83.695 nome de Nederlanda Esperanto-Junularo, Meijhorst 17-55, NL-6537 KE Nijmegen. Temo: "Tute natura". Programo: pritemaj diskutoj, plezurigaj vesperoj kaj vizito al la muzeo "Tute natura". Informas: Mariken Creuwels, Balijelaan 16, NL-3521 GR Utrecht, Nederlando.

26 - 3 maj: Seminario de TEJO kaj PSEK por grupgvidantoj; Kazimierz Dolny (Pollando). Kosto: 150 gld. Informas: Jan Koszmaluk, ul. Zwirki i Wigury 97/99 p 511, PL-02-089 Warszawa, Pollando.

### MAJO

1 - 3: Unumaja renkontiĝo de Esperanto-junularo de Bosnio kaj Hercegovino; Bosanska Krupa (YU). Kosto: 1200 dinaroj). Informas: Esperanto, Vase Pelagicá 8/I, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio.

16 - 20: Internacia Renkontiĝo Junulara; Oslo (N). Kosto: 300 NKr (salajruloj devas pagi 30 NKr pli). Informas: Norvega Junularo Esperantista, Fr. Frøknes v. 2, N-3506 Røyse, Norvegio.

### JUNIO

8 - 17: Dua Internacia Luda Seminario (ILSE); Goldenstedt (FR Germanio). Kosto: DM 50 - 60 por la unua semajnfino; DM 55 - 70 por la dua semajnfino; DM 90 - 110 por la tuta seminario (Ju pli frue vi aliĝos des malpli kostos). Programo: ĉia ludado. Informas: Eckhard Bick, Cäcilienstr. 32, D-5300 Bonn 3, F. R. Germanio.

29 - 13 julio: Bicikla Karavano de Damme (Norda Germanio) tra Nederlando kaj Belgio al Swanwick, Britio, 40a IJK. Aventureca, malmultekosta! Je la 6-a de julio renkontiĝo kun angloj en Dovro. Informiĝu kaj aliĝu ĉe: Thomas Bormann, Koppel 94, D-2000 Hamburg 1. Se vi biciklos nur ekde Dovro, rekte turnu vin al: Thomas Pusch, Am Schwertberge 23, D-2845 Damme. Karavano ekde Parizo: Patrick Lagrange, JEFO, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris

## JULIO

unua duono: Naturamika Tendaro de Budapeŝta Medio- kaj Naturprotektada Fakgrupo de HEA; norda Hungario. Informas: Rezsö Baross, Balzac u. 11, H-1136 Budapest, Hungario.

1 - 14: Unua etapo de Somera Esperanto-Tendaro, Lanĉov (Ĉeĥoslovakio). Kosto: 1200 Kĉs. Programo: lingvolernado, banado, sportado, ekskursoj, ktp. Informas: Esperanto-klubo, loka grupo de ĈEA, CS-67401 Třebíĉ, Ĉeĥoslovakio.

1 - 11: Esperanta Kajaka Tendaro ĉe la nord-orient-polaj lagoj laŭlonge de la rivero Krutynia, organizata far la PSEK-grupo en Zielona Góra. Kosto: DM 200. Informiĝu kaj aliĝu ĉe: Franz Kruse, Mathildenstr. 73, D-2800 Bremen 1, F. R. Germanio.

1 - 15: Internacia Infana Esperanto-Urbeto; Bydgoszcz (Pollando). Informas: Esperantotur, M. Skłodowskiej- Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Poll.

6 - 8: Somernokta Festo de GEJ, Egelsbach, FR Germanio. Kosto: 30 - 40 DM, rabatoj por eksterlandanoj. Programo: nokta migrado, diskutado pri aktuala temo, perpieda ralio, dancado, kantado, muzevizitado, sportado, ktp. Informas: Martina Woite, An der Kirche 33, D-6115 Münster/Dieburg, F. R. Germanio.

12 - 15: 44a Hispana Esperanto-Kongreso kun junulara programo; Sevilla (Hisp.). Informas: SEJO, C/.Sol 75, Sevilla-3, Hispanio.

13 - 20: Internacia Junulara Kongreso de TEJO; Swanwick (GB). Vidu TT 1/84 por informoj kaj aliĝilo. Informas: LKK de la 40a IJK, 140 Holland Park Ave., London, Britio W11 4UF

15 - 22: Unua Kongreseto de la Kastora Klubo; Bydgoszcz (Pollando). Informas: Kastora Klubo, ul. Klonowa 18, PL-00-591 Warszawa, Pollando.

15 - 28: Dua etapo de Somera Esperanto-Tendaro; Lanĉov, Ĉeĥoslovakio. Detaloj kiel ĉe la unua etapo je 84-07-01/14.

27 - 31: Renkontiĝo de la Junulfako de Sennacieca Asocio Tutmonda; Villandraut (Francio). Temo: pacismo, ĉu baldaŭ mondmilito? Programo: diskutado, filmprezentado, kanot- kaj bicikloekskursoj, vizitoj al arbara vilaĝo kaj mezepoka kastelo, ktp. Informas: Michel Bauret, 17 rue Utrillo, F-33140 Villnave, Francio.

29 - 11 (aŭg): Tria etapo de Somera Esperanto-Tendaro; Lanĉov, Ĉeĥoslovakio, Detaloj kiel ĉe la unua etapo je 84-07-01/14.